VI-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda
Leningrado 5—10 aŭgusto 1926.

D 8
94

KONGRESA KANTARETO

DONACE POR LA KONGRESANOJ
ELDONIS UNUIGITA ELDONEJO
„LA NOVA EPOKO" ĈE C. K. SEU.

MOSKVO
1926 r.

Отпечатано в типографии «Восток»
издат. «ГАЖУР», Казань, Казанская 4,
в количестве 1000 экземпляров.
Татглавлит № 948. Заказ № 366.

La Internacio.

Leviĝu, en mizer' dronanta
Sklavar' malsata de la ter'!
Raci' nin vokas indignanta
Al mortbatalo pro l'liber'.
Malnovan mondon ni detruos
Ĝis fundament' de l' tirani'
Kaj nian novan ni kon-truos;
Ne nuloj—ĉio estu ni!

(*Rekantaĵo*)

Ne la cezar', nek dia volo
La savon portos de l' tiran',—
Liberon donos al popolo
Nur ĝia propra forta man'.
Por ke pereu la rabuloj,
Por liberiĝu la spirit'
Varmegan feron la forĝuloj,
Ni forĝu mem sen intermit'.

(*Rekantaĵo*)

Nur ni, laborarmeaj eroj,
De l'urboj kaj de la kampar',
Posedas rajton pri la tero!
Vi iru for, parazitar'!
Kaj se por via bando puno
Alvenos en la flamribel',
Por ni ekbrilos hela suno
Radiadante en ĉiel'.

(*Rekantaĵo*).

Rekantaĵo:

Por finlukto socia
Ni grupiĝu en rond',
Kaj la Internacio
Triumfu en tutmond'!

(*Kompil-tradukis* **J. Zilberfarb**).

Senlima Lando.

Kanto de SAT-anaro

Kial nur part' de ter' estus patria land',
Kiu nin en sufer' baras per lima rand',
Donas al unu klas' lukson kun la komfort'
Rabas ĉe sklava mas' ĉion ĝis ties mort'?

Ĉu do en land' kun lim' estus por rajto spac',
Kie prolet', viktim' sklavas sub la minac'
De la perforta skurĝ' ĉiam dum granda ŝtel'
Uzas ĝin raba burĝ' nur por malica cel'?

Estas ne land' por am' tiá ĉi fi-patri'
Armas prolet' sin jam ĉiel nun kontraŭ ĝi;
Ĉie en vasta mond' levu sin ĉiu sklav'
Kune en frata rond' tuj por la fina sav'.

Krakas el suba ŝakt', bruas sub firma mont',
Hakas kun sona takt' ĝuste por la estont',
Jen pro fortega man' falos patria mur'
Batas ĝin jam SAT-an' do por justeco nur'.

Brilas radi' de sun' tra la vastega SAT,
Donas esperon nun bone al ĉiu frat',
Flirtos tre bela flag' super senlima land',
Venos la nova tag' paca sen burĝa band'.

(*Originale verkis* **Karl Johansson**).

Himno.

Ondegoj iras kaj revenas,
Abismen glutas tradicion,
La burĝa klaso morte svenas,
Spertante sian agonion.

(*Rekantaĵo*)

Jen obstinege, kun persisto
Luktadas pro liber' sklavaro,
Ne venkas plu kapitalisto
Sub la kreskanta kontraŭstaro.

(*Rekanta`o*)

Ekregos jam spiritlibero
Post proletara finbatalo,
Kaj ĉesos de l' sklavec' sufero
Post ekspluatantara falo.

(*Rekantaĵo*)

Sed ni pretigas la spiritojn,
Taskegoj ke nin ne konsumu,
Ke forbatinte parazitojn
La novajn ag jn ni plenumu.

(*Rekantaĵo*)

Rekantaĵo:

Ŝiru, ŝiru, ĝis pens' forigas
De l' vanta, senbaza fi-naciemo!
Tiru, tiru, ĝis dissolviĝos
La naciisma trompo-sistemo!
Sennacieco nia cel',
Kulturo nova sub brila stel'!

(*Originale verkis* **N. Barthelmess**).

Marŝo.

Muz. de «Jungvardio»

Kuraĝe, kamaradoj,
En klasa finbatal'
Ni rompu landokradojn
De ruza Kapital'.
Kuraĝe marŝu ni kun ard'
Kaj alte flirtu SAT-standard'.

(*Rekantaĵo*)

En mondkonkuro forta
Por ĉies naskoland'
Preparas zorge morton
Ekspluatista band'.
Sed gasoj, kuglo, dinamit'
Ja taŭgas por civil-milit'.

(*Rekantaĵo*)

Sennaciul-armeo
Varbita el tutmond'
Atingos burĝ-pereon
Per unueca front'.
Jam akvo, tero kaj aer'
Plenplenas je prolet-sufer'
(*Rekantaĵo*)

Rekantaĵo:

Ni venu al estont-soci'
Tra barojn de naci'!

(*Originale verkis* **Vs. Ivanov**).

SAT-Marŝo.

Motivo de «Varŝavjanka».

Mondon plenigas proleta sufero.
Sangefestenas en mond' kapital'
Levu standardojn de fajra libero,
Kamaradaro, en fina batal'!
Ekster la limoj de ajna nacio
Forĝu do ni unuecon de l' front'
Por tra ventegoj de l' revolucio
Marŝi kuraĝe al bela estont'!
(*Rekantaĵo*).

Kapitalismo senfrukte klopodas
Sklavojn disigi per mur' de naci'.
Ĉar la tutmondo baldaŭe eksplodos
Per dinamito de l' revoluci'!
Klason de burĝoj skuegas la ondoj!
Estas proksima jam ĝia disfal'.
Do unuiĝu proletoj tutmondaj,
Vicojn kunigu por lasta batal'!
(*Rekantaĵo*).

Gason preparas, mortigdinamiton
Kapitalistoj de ĉies naci'...
Ni al milito proklamas militon
Por neniigo de burĝa soci'.

Sennaciula tutmonda armeo
Forĝu al si unuecon de l' front'!
Marŝu kuraĝe al venk' de l' ideo,
Marŝu kuraĝe al bela estont'!
(*Rekantaĵo*)

Rekantaĵo:
Marŝu antaŭen, la avangardo!
Burĝojn atakU per ondoalbat'!
Per vicoj ardaj sub la standardo
Kun la kvinpinta emblemo de SAT!
(*Originale verkis* **S. Davidov**).

Revolucia „Espero".

En la mondo blovas nova vento.
Tra la mondo iras forta voko.
En la kantoj de la ruĝa sento
Nun de loko flugu ĝi al loko!
Vokas ĝi al glavo kaj milito
Laboristojn nun de l'tuta tero!
Al proleta klaso turmentita
Ĝi promesas pacon kaj liberon.
Sub standardo ruĝa de ribelo
Kolektiĝas fortaj batalantoj,
Kaj rapide iras al la celo
Kun bataloj kaj kun ruĝaj kantoj.
Forte staris muroj de miljaroj
Inter laboristoj dividitaj...
Sed dissaltos la obstinaj baroj
Per komuna lingvo disbatitaj.
Sur la forta klasa fundamento
Helpe de la lingvo Esperanto,
Laboristoj faros en konsento
Unu grandan rondon batalantan.
Niaj bravaj fortaj kamaradoj
En batalo sanga ne laciĝos,
Gis la ĉenoj de la perfortado
Por liber' eterna disrompiĝos.
(*Novigis* **S. Drjagin**).

Funebra Marŝo.

Viktime vi falis en kruda batal',
Pro am' al popol' en sindono.
Vi ĉion fordonis pro ĝia liber',
Pro vivo, honoro kaj bono.
Vi ofte suferis en malliberej'l...
Verdikton maljustan sen ĝenoj
Juĝistoj vampiroj dediĉis al vi:
«Vi iros sonante per ĉenoj».
Vi iras lacega, sonoras katen';
Kun manoj, pied' j ĉenitaj
Trankvile—malĝoje rigardas vi jen
Antaŭen tra vojo ŝtonita
Varmiĝis la ĉenoj pro suna varmeg',
En karnon eniĝis la fero,
Kaj gutas el vundoj, kaŭzitaj de ĝi,
La sango varmega al tero...
Sed portas katenojn vi kun silentad',
Pro kara afer' vi suferas,
Pro ke vi ne povas kun indiferent'
Rigardi, ke frato mizeras.
En via anim' vivas sankta la kred',
Ke vero la ŝtalon superas,
Ke venos la hor' de respekto al sang',
Vi kiun pro frato oferas.
Pereon sentante en ora palac'
Festene dibočas tirano,
Sed signojn minacajn delonge sur mur'
Desegnas fatala jam mano,
Pereos la jugo, leviĝos popol'
Grandega, potenca, libera!
Adiaŭ do, fratoj, vi iris kun nobl'
Tra l' vojo honesta, fiera.

(*El rusa lingvo trad.* **E. Miĥalski**).